

Tentative pour dégrossir un chemin de fer

**Toute la titraile de la Une
reste à inventer !**



La vorto de la prezidanto

En la Kongreso, ni promesis, ke la numero 121 de la Sago aperos, kaj ni deziris, ke ĝi aperu kiel eble plej proksime de la 1a de majo. Tiu ĉi lasta deziro montriĝis tro optimisma, sed jen ni havas la numeron 121 de la Sago, notinde dank'al la diligento de Jean-Luc Ancey, kiu malgraŭ nia deziro disponis nur tre malmultan tempon por realigi la engaĝigon. Ni estas tre konsciaj pri la mankoj. Pri ili ni humile pentas. La foto de la paĝo 3 povus ilustrii nian bonan volon laŭpove fronti ilin kaj la aliajn problemojn de la Asocio. Ni provos pli bone kaj rapide fari venontan fojon. Iu tre prave rimarkigis, ke la Kongreso liveris pri la nuno kaj estonteco de SAT-Amikaro pli da demandoj ol da respondoj. Tio signifas interalie, ke la laboro de SAT-Amikaro ne estas finita. Ĝi bezonas la aktivan kontribuon de ĉiuj membroj kaj ni rajtas danki nin ĉiujn, unuj la aliajn.

Petro

Kio estas SAT ?

Sennacieca Asocio Tutmonda : naskiĝis en 1921, estas asocio tutmonda de laboristoj, kaj pli ĝenerale de progresemuloj, kies agado centriĝas sur kulturo kaj popola edukado. Ĝi utiligas Esperanton kiel laborlingvon. www.satesperanto.org

Aliĝo kun abono al « Sennaciulo » 52 € (Nura abono : 57 €)

• **En Francio** : Barthélémy Maurau : 3, allée Nathalie-Sarraute, 27000 Evreux p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

IBAN : FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070; BIC : PSSFRPPPAR

• **En Belgio** : Claude Glady; Rue du Colot, 1; B-5630 Cerfontaine; Bankkonto N° 750-6373051-18

SAT-Amikaro

132/134, boulevard Vincent-Auriol, 75013 Paris
Tel. : 09 53 50 99 58. Fax : 09 58 50 99 58.

sekretario@sat-amikaro.org

Retejo

www.sat-amikaro.org

• Sideja deĵorhoraro. *Permanence au siège* (kontroli antaŭe telefone) (*vérifier avant par téléphone*)

Lundi 17:30 - 19:00

Mardi 14:00 - 18:00

Mercredi 13:00 - 18:00

Jeudi 15:00 - 18:00

Vendredi 9:30 - 16:30 ; 18:30 - 19:30

Samedi 11:00 - 18:00 dont de 15:00 à 18:00 initiation possible pour débutant y compris en juillet
• Cours oraux au siège - pour débutants :

Les lundis 17:30 avec Georges Meilhac

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro. (cherchez la rubrique « Cours d'espéranto » : <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>)

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Conseils d'apprentissage : contactez SAT-Amikaro libroservo

Tarifoj Tarifs	Be, CH Fr	Aliaj landoj
Kotizo (kun abono 60 %) <i>Cotisation (avec abonnement)</i>	35,00 €	42,00 €
Kotizo sen abono <i>Cotisation sans abonnement</i>	14,00 €	14,00 €
Subtenkotizo (abono 30 %) <i>Cotis. soutien (abon. 30 %)</i>	70,00 €	84,00 €
Junulo (malpli ol 25 j.), senlaborulo, kunul(in)o <i>Jeune (moins de 25 ans), chômeur, conjoint(e)</i>	17,50 €	21,00 €
Minimuma kotizo <i>Cotisation minimale</i>	libera libre	libera libre
Simpla abono <i>Abonnement simple</i>	32,00 €	39,00 €

Paiements et renseignements sur SAT-Amikaro

• **Belgio Belgique** : Claude Glady : Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto : cglady@arcadis.be

Tel : 071/64 49 16 (en Belgio). Bankkonto N° 750-6373051-18
IBAN B50 7506 3730 5118 BIC : AXABBE22

• **Svisio Suisse** Mireille Grosjean : Grand-Rue 9, CP 9, CH-2416 Les Brenets. Poŝta konto n° 23-14908-9.

• **Aliaj landoj autres pays** Pagoj *paiements* poŝta sendo sidejen *envoi postal au siège*.
reto : kasisto@sat-amikaro.org

Tel : 0033 (0) 953 927 737

Fakso : 0033 (0) 222 441 319

• **Pago per ĝiro virement** : SAT-Amikaro.

LBP (CCP) : 37 852 90 L 033

IBAN, FR32 2004 1010 1237 8529 0L03 314; BIC : PSSTFRPPSCE

(indikante al kio kaj al kiu rilatas la pago *en indiquant l'objet et le bénéficiaire du paiement*)

La Sago

CPPAP n° 0322 G 86224. ISSN : 1763-1319. SAT-Amikaro, 132/134, boulevard Vincent-Auriol, 75013 Paris.

Directeur de la publication : Pierre Lévy.

Imprimé par :

Parbleu! Ravin Bleu 75017 Paris.

Dépôt légal à parution.

Ĉefredaktanto : Petro Levi.

Engaĝiganto : Jean-Luc Ancey.

Redakt- kaj kontrol-skipo : Janine kaj Yannick Dumoulin, Luk' Gouverneur, Ĵak Le Puil, Petro Levi.

Partoprenis en ĉi numero :

Vinĉo Courouble, Janine Dumoulin, Lucette Echappé, Pierre Grollemund, Izabel' LamiRested', Ĵak Le Puil, Petro Levi, Vito Markovo, Stefan'.

Kontribuajoj

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto :

Provizore al : sekretario@sat-amikaro.org kaj paralele al lucette.lumeto@laposte.net

Samajn retadresojn por ajnaj rimarkoj/kritikoj (sed ĝentilaj) *Mêmes adresses courriel pour toutes remarques*

• Prefere per reto, tekstoj en RTF-, ODT- aŭ TXT-formo por litigitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, bildoj en TIFF-, JPEG-, PCX- aŭ GIF-formo.

• Eventuale sur papero, tekstoj prefere tajpitaj.

• Artikoloj ricevitaj post la 20a de la paraj monatoj ne povas esperi aperigon en la tuj sekvonta numero.

Contributions

Toujours bienvenues ! À faire parvenir au correspondant de la rédaction :

• *De préférence par Internet, textes en format RTF, ODT ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG, PCX ou GIF.*

• *éventuellement sur papier par poste, les textes de préférence typographiés pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge).*

• *Les articles reçus après le 20 des mois pairs ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro immédiatement suivant.*

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto.

Protokolo de la 70a SAT-Amikara Kongreso en Parizo

kun komentita Agadraporto de la Komitato de SAT-Amikaro por la jaro 2017-2018

* Unua laborkunsido, dimanĉe 1an de Aprilo

** *Enkonduko*

Prezento de la OKK-anoj : Petro Levi [Pierre Lévy] Prezidanto, Lumeto/Lucette Echappé, Ansofi Markov [Anne-Sophie Markov], Elisabeth Barbay, Bernard Cornevin, Thérèse Sabatier.

La kvar unuaj OKK-anoj estas ankaŭ membroj de la Komitato de SAT-Amikaro, kun Solange Van Landeghem, kasistino de SAT-Amikaro ; Lumeto estas ĝia sekretariino.

Lumeto malfermas la kongreson. 30 homoj ĉeestas la salonon.

Petro kiel prezidanto salutas :

« Saluton kaj bonvenon al ĉiuj ĉeestantoj kaj partoprenantoj de la 70a kongreso de SAT-Amikaro.

Tiu kongreso estas principe kongreso de franclingva parto de la poresperanta fako de la Tutmonda Movado de la Esperantistaj Laboristoj, kiu ĉefe celas faciligi per Esperanto la internacian komunikadon inter malsamlingvaj laboristoj por komunaj celoj. La peresperanta fako de tiu sama movado estas SAT, Tutmonda Asocio de Esperantistaj Laboristoj. SAT-Amikaro ankaŭ principe estas la ilo de kunlaboro inter ĉiuj lokaj grupoj de Esperantistaj Franclingvaj laboristoj. La aparta strukturo de la Tutmonda Movado de la Esperantistaj Laboristoj estas nomita sennacieca (unua litero de la siglo SAT) kaj ebligita de la uzado de komuna lingvo, Esperanto. Ĝi estas nek federacia, nek centrisma, sed celas sur ĉiu tereno de aktiveco certigi la kolektivitan, demokratian suverenecon de la koncernataj membroj. Iuj esperantistaj laboristoj, kiuj nomas sin tial sennaciistoj, eĉ konsideras preni tiun apartan organizmanieron kiel modelon por estonta organizado de pacigita Mondo. Mi estas multe tro maljuna por esperi vidi tion. Detalojn pri tio esperantistoj povas legi interalie en la verko « La progresema Esperanto-Movado en perspektivo » eldonita de la asocio SAT en Esperanto.

Dum tiuj tagoj, inter debatoj pri la estonta vivo kaj agado de la Asocio, ni aŭskultos diversajn prelegojn kaj ĉeestos diversajn kulturajn spektaklojn. Ankaŭ interesaj ekskursoj estas antaŭvidataj.

Nia ĉefa kongresa temo tamen estas nia rilato al la junuloj kaj al ilia estonteco. Ni malkovros kun ili tion, kio estas preparita por ili en tiu kongreso, en kiu ili mem jam komencis partopreni per desegnokonkurso.

Tiuj seriozaj temoj ne forgesigu la neceson fronti ĉiujn cirkonstancojn de la vivo



Nia Prezidanto, Petro Levi, akceptante la kongresanojn.

kun bona humoro. Mi kutimas diri, ke pli bone estas ridi sen motivo, ol plori kun motivo.

Mi deklaras la 70-an kongreson de SAT-Amikaro malfermita ! »

Bondeziroj de Nikolao Karvalo kiu sendis leteron favore al la kurdoj.

Saluto de liberecana grupo de Parizo.

Protokolas Paŭlino Gaborito [Pauline Gaborit] kaj Markovo Vito [Vito Markov].

Kunsidprezidantoj : Maximilien Guérin por dimanĉo matene, Marcelle Provost por dimanĉo posttagmeze.

Salutvortoj : Vito, de Grezijono (SAT-Amikaro ne plu povas komitatumi sed individuoj jes). Anonco pri ReVe (Renkontiĝo Vegana). Ansofi, de Kvinpetalo, de asocio ILO (loka grupo el Châteaufort, 78) kaj anoncas pri aperigo de libro, kiun la grupo proponas al SAT-Amikaro por eldono. Ŝi ankaŭ salutas nome de SAT, precizigante ke ties prezidanto Vinko Markovo ne povis veni pro familiaj kialoj. Laurent Prezioso, de Frejusa grupo kaj anoncas pri Mediteranea Esperanto-Semajno. Didier Janot de FEI, Espéranto-France kaj Francilia grupo (atentigas ke ne estis multe da komunikado, invitas ke ni rilatu kun la lokaj membroj kiam evento estas organizata).

Prezento de sep desegnaĵoj por la kongresa konkurso. Ĉar estas nur 7, OKK decidis premi ĉiujn. Lumeto precizigas ke Tereza Sabatier havis la ideon pri tiu konkurso.

** *Agadraporto de la Ko-*

mitato de SAT-Amikaro por la jaro 2017-2018

*** *Enkonduko*

Ansofi : Aperis iu mallonga en La Sago farita streĉe kaj malfacile ĉar mankis tempo por redakti ĝin. Alia raporto pli kompleta aperas en la kongreslibreto (subskribita de la Prezidanto : Pierre Lévy (Petro Levi) kaj de la Sekretariino : Lucette Echappé (Lumeto). Lumeto ĝin laŭtlegas.

(Enhavo : 1) Sidejo ; 2) Ĝenerala agado dum 11 monatoj ; 3) Pri interna funkciado de la Komitato ; 4) Pri funkciado de la SAT-Amikaraj grupoj ; 5) Pri La Sago, 6) FEI)

*** *1) Sidejo*

Aktivas en la sidejo ĉefe Véronik' Girard kaj Phil Guichet kaj ankaŭ pluraj membroj de la Pariza Grupo :

G. Cavalier, L. Bresler, T. Pinet, E. Eliard, I. Lamy-Rested, E. Barbay, A. Nouri, G. Fillion, G. Meilhac.

Sideja laboro kaj kutima laboro daŭrigita ĉe la libroservo :

• Veronik' laboradis pri :

- kontado kaj entabeligo de la vendoj en la butiko,

- kontado de la vendoj post la kongreso kaj por budoj funkciantaj en diversaj cirkonstancoj,

- rilatoj al la klientoj (retmesaĝaj fakturoj, mendoj por ke la libroservo ricevu librojn), ordigo, bilanco, kontado.

- sensukcesa provado uzi la registradan ilon por kontadi (Openconcerto) kun Guy

Martin (= Gimo)

- enpakigon kaj enpoŝtigon ĉefe traktis Phil Guichet helpita de Lucien Bresler, foje de Veronik' ;
- bilancon de la libroj ĉe la bretoj ĉefe zorgis Thérèse Pinet ;
- sendon al la nepagipovaj esperantistoj zorgis Eric Eliard ; Veronik' translokgis la tiurilatan stokon de Bretonio al la sidejo ;

- eldonlaboron kaj estontajn eldonojn prizorgas Veronik', notinde :
 - « petite grammaire », kiun indas provlegi ;

- junulkurso kiu preskaŭ pretas ;
- reeldono de flugfolioj.

- la libroservo vendis
 - 208 dictionnaires de poche
 - 124 dictionnaires pratiques
 - 90 cours rationnels
 - 77 PIV 2015
 - 65 « Dek kugloj »

- 44 teknikaj vortaroj

- etkvante, aliajn librojn aŭ eĉ vortarojn.
- 48 ekzemplerojn de la filmo de D. Gautier pri la Esperanto movado.

- El la esperantaj eldonoj, dum jaro 2017, ni vendis 360 malsamajn titolojn (krom brokantaĵo)

- pluraj membroj regule aŭ foje zorgas pri kroma laboro : purigi la sidejon (Isabelle Lamy-Rested), sekretariaj taskoj, komendi poŝtajn leterojn al SAT-Amikara Komitato, al Sennaciulo (Phil, Lucien, Veronik').

- babilrondon zorgis Eric Eliard, Abdel Nouri, Jean-Michel Annequin.

- kursoj estas gvidataj en la sidejo (Phil, Georges Meilhac, Elizabet Barbay, Gérard Fillion).

- Inundon el la supra apartamento kaj inundon en la korta kelo zorgis Phil, Eric, Veronik'. Rilatojn pri la asekuro prizorgis Eric kaj Lumeto. Ekde nun, eĉ iom urĝe, plie sekve de inundoj, la sidejo bezonas intervenojn de pluraj fakuloj : masonisto, elektristo ; eble eĉ ni devus ekspertizi la fortekecon de la muroj... Eric Eliard komencis peti prezprojekton de entreprenisto.

- Deĵorado en la sidejo okazas dank' al Phil, Lucien, Gérard, Lumeto. Phil anoncis ke bedaŭrinde, pro sia sanstato, li ne plu povos prizorgi la sidejon.

- Dank'al la sidejo, la parizanoj povas kunveni en niaj ejoj. Tiel ili malfermas la sidejon, kaj tio permesas montri la sidejon malfermita kelkajn horojn plie.

Veroniko [Véronique Girard] : « Mi ne aktivis en la sidejo, sed nur por libroservo el Normandio ».

Eric Eliard : aldonas ke aktivas ankaŭ Régis Fournier (= Regis) en la sidejo.

Vito : korektas 2 erarojn : ne PIV 2015 sed PIV 2005 (eldonjaro), kaj « Dek du kugloj » anstataŭ « Dek kugloj ».

Eric : « Regis multe zorgas pri babilrondo. »

Elizabet indikas, ke la riparlaboroj jam ekis.

Eric : jam riparitaj estas la sunkurteno kaj aerumiloj de la kelo. Antaŭfakturo estis ricevita hieraŭ pri vertikalo de hejtilo.

*** 2) Ĝenerala agado de SAT-A-



Dum la teatra vespero ties emociita temo estas: 'la forgesitaj de l'Historio'; kaj la spektantoj estis invititaj aktive partopreni la spektaklon.

mikaro dum 11 monatoj :

Maximilien Guérin vigligadas paĝon Facebook ĉe (por) SAT-Amikaro, eĉ Twitter, Youtube, ktp.

De kelkaj semajnoj, ni ĝiris la sumon de 6 000 eŭroj = 3 partoj B, al Grezijono. Ni nek povis tuj respondi al demandoj afable faritaj pri tio, nek pagi tiun tamen grandan sumon, ĝis ni regis niajn kontojn.

En septembro 2017, ni kalkulis la rezulton de la demandaro. Skipe ni analizis kaj publikigis tiujn rezultojn.

Ni malfermis la librejon kvin fojojn dum du sinsekvaj tagoj, alie dum tiuj tagoj la libroservo restus fermita al la publiko.

Ni fizike iris al Prefektejo du sinsekvajn tagojn por klarigi la dosieron de SAT-Amikaro. Pli frue, tiun dosieron ni ne povis konsulti sur la reto, nek eniri ĝin, ĉar ĝi ne estis en ordo.

Luj el ni partoprenis la konferencon organizitan en UNESKO kunlabore kun UEA kaj SAT.

Ĝi okazis plurlingve pri la temo : « Kiel fartas Esperanto cent jarojn post morto de Zamenhof ? » Ni povus resume kaj konklude respondi, ke ĝi fartas nek tiel bone, kiel estus dezirinde por efika interpopola kompreniĝo, nek tiel malbone, kiel dezirus kaj propagandas ĝiaj malamikoj.

Ni partoprenis la ĝeneralan kunvenon de Grezijono.

Luj partoprenis la Feston de la franca gazeto « l'Humanité ».

Ni dungis Isabelle Nicolas, ekde februaro 2018. Ŝi deĵoras ĉiujn merkredojn posttagmeze, dum ses monatoj.

Ni preparadas SATamikan Kongreson. Kadre de tiu ni alvokis aŭ skribe kontaktis multajn esperantistojn.

Ni akceptis, ke ĝenerala kunveno de kunproprietuloj okazu en nia sidejo, tiel fortigante bonajn rilatojn kun ili.

Ni dufoje suferis akvajn difektojn, kaj kvankam Eric multe helpas, ni devas rilati kun asekuro kaj sekvi la aferojn.

Pri ordigo de la kontoj de SAT-Amikaro. Ni bezonis multan tempon, interalie kun fizikaj klopodoj, por ŝanĝi la subskribojn

al La Banque Postale por kongreso mem ; al La Banque Postale por la konto de SAT-Amikaro. La kondiĉoj kaj klopodoj tute bonintence postulitaj de diversaj instancoj de la Banque Postale por tre prave protekti la kontojn, kaj geografia diseco de la novaj kaj malnovaj komitatanoj, malrapideco de la banka administracio kaŭzis tro temporabajn malfacilaĵojn por tiuj aktualigadoj, parte kafkaa kaj foje kurtelina situacio !

Nia kasistino Solange Van Landeghem, per profesia metodo, multe laboradis por repreni la regadon pri niaj kontoj.

Maksimiliano : kreis Fejsbukan SAT-Amikaran paĝon por diskonigi niajn informojn, agadojn. Precipe bezonas materialon por nutri la Fejsbukan paĝon de SAT-Amikaro. Ekzemple lokaj eventoj de kluboj, sociaj luktoj. Prefere dulingve Fr/Eo. Ankaŭ ekzistas Jutuba kanalo de SAT-Amikaro. Se iu faras filmojn, sendi al li por ke li diskonigu. Ne eblas plu ignori tiujn komunikilojn, ni devas adaptiĝi kaj malfermiĝi al tiuj sociaj retoj. Ne necesas ke ĉiuj anoj aliĝu al tiu socia reto, ĉar ĝi estas libera, videbla de ĉiuj. Li atentigas ke sur la kongreslibro estas eraro : ĝuste estas <maksimiliano.esperanto@yahoo.fr>

Elizabet demandas kiallingve oni prefere sendu la informojn.

Maksimiliano : prefere dulingve.

Solange : necesis ŝanĝi la subskribojn kaj okazis malfrue kaj estis administraj komplikaj. Mi havas la subskribon nur de komenco de 2018. Ĝiro farita al Grezijono tra la NEF-konto.

Paŭlino : Pri la sumo ĝirita al Grezijono : ne 3 partoj B, sed 30 (ĉar 30 x 200 = 6 000 eŭroj).

Petro : Paso de unu skipo al alia estis akrobata afero pro geografia diseco de la komitatanoj.

Ansofi : okazis pluraj prelegoj de historiistoj kaj sociologoj dum UNESKO-konferenco, kune organizita de UEA kaj SAT kun delegitoj el Polio.

Vito : aldonas ke SAT-Amikaranoj partoprenis la SAT-kongreson en Seulo.

Elizabeto : mencias pri junia festo de ler-

nantoj, Zamenhofa tago, kaj kunsidoj de Pariza grupo.

*** 3) Pri interna funkciado de la Komitato.

Ses komitatoj estis elektitaj de la membraro kaj funkciis de septembro, sed unu demisiis antaŭ la fino de la monato pro malkonsento kun la aliaj pri voĉdonita, neakceptita de li, decido pri kongreso en Parizo.

La kvin restantaj komitatoj estas laŭbezone en praktike konstanta rilato, rete, telefone, skribe kaj fizike. Dum kaj por siaj taskoj ili ankaŭ rilatis kaj rilatas kun multaj membroj. Pluraj membroj de la Komitato eksperimentis eblecon de telefona kunveno. La farita tro limita eksperimento montras, ke tiu procedo de kolektiva komunikado probable promesas pli vastan kaj sisteman estontan uzon.

Pri la demisio de Serĝo Sir [Serge Sire], Vito : demandas klarigojn ĉar la versio de la agadraporto kaj de Serĝo en La Sago estas malsamaj.

Ansofi : konfirmas la agadraportan version.

Solange : pli ŝatus Bordozone pro organizaj facilajoj. Laŭ ŝi, la du proponoj alvenis preskaŭ samtempe kaj la Kelermana propono estis jam komencita kiam la Bordoza propono alvenis.

Petro : akceptis la Bordozean proponon komence sed kiam alvenis informoj pri la organizado, ŝajnis al li malfacile kunveni en diversaj lokoj malproksime unu de la aliaj de tro da kilometroj. Li aldonas ke la Kelermana propono alvenis poste kaj ŝajnis al li pli precize difinita. Necesis decido. Nia decido signifis nenian malaprobos al la Bordoza propono.

Regis : demandas kiu proponis la Bordozean proponon ?

Petro : la propono pri Bordozeo estis dankinde farita de Marcel Redoulez kaj transdonita de Serĝo.

Vito : bedaŭras mankon de informoj dum 6 monatoj en La Sago por pli bone kompreni kio okazas en la komitato. Li informas ke estis skribita en La Sago ke la Bordoza grupo proponis la kunvenon.

Elizabet : respondis al Serĝo ke ŝi fajfis pri kie okazus la kongreso sed ke ŝi partoprenus nur en Parizo.

Vito : diras, ke la Bordoza grupo neniam

plu proponos ion pro la malakcepto farita.

Lumeto : diras ke la respondo de Elizabet konfirmis la decidon kongresi en Parizo.

*** 4) Pri funkciado de la SAT-Amikaraj grupoj.

La plimulto el la kamaradoj, kiuj prizorgas la sidejon kaj vivigas ĝin, estas membroj de la Pariza Grupo de SAT-Amikaro. En ĝi partoprenas nia komitatanino Elisabeth Barbay interalie per kursoj, kiujn ŝi animas en la sidejo.

Krom la Pariza Grupo funkcias ankaŭ aliaj lokaj grupoj, kiuj ne sendis raporton kaj tamen agadas.

Ni scias pri funkciado de grupoj, en kiuj ni mem, komitatoj, agadas.

En la grupo « Esperanto 44 » agadas nia sekretario, Lucette (Lumeto) Echappé, kiu organizas semajnfinajn staĝojn pri diversaj temoj, kaj por lernado de Esperanto en la Nanta regiono. Ŝi ankaŭ animas ĉiusemajne de septembro komencajn kursojn en elementa lernejo. Tio estas la rezulto de ŝia antaŭa agado en la urbo, kie ŝi partoprenis la organizadon de la lasta kongreso de SAT-Amikaro.

En la Kadro de la sendependa asocio ILO, en kiu agadas pluraj SAT-Amikaranoj, agadas ankaŭ Ansofi Markov, kiu animas kursojn dufoje semajne, kaj Petro Levi, kiu finkorektas la tradukaĵojn de la grupo. Ili, krom kursoj, organizas Esperanto-koncertojn, kaj tradukas en kursoj teatraĵojn aŭ aliajn verkojn, kiujn ili ŝatus konatigi al la esperanta publiko. Ansofi ankaŭ regule animas staĝojn en la Kulturcentroj de Grezijono kaj Kvinpetalo, kaj organizas ekzamensesiojn de FEI.

La Asocio Esperanto-Gironde preparas jubilean feston, okazontan inter la 2a kaj la 7a de majo, de sia kvindekjara ekzisto. Danielo : proponas venontan kongreson (eble) en 2019 en Montluçon ; lia grupo pripensis organizi ĝin jam antaŭ unu jaro. Li prezentos la ontan kongreson morgaŭ, lunde 2an de aprilo.

Regis : demandas ĉu en 2020 SAT-Amikaro kongresus kun la Franca Unuiĝo.

Vito : demandoj faritaj pri ĉu la raporto estis senditaj de la lokaj grupoj kaj kiuj estas ili.

Veroniko : demandas ĉu la Komitato kontaktis la grupojn por ke ili sendu raporton.

Ansofi : diras ke la komitatoj ne sukcesis fari ĉion kion ili deziris fari.

Lumeto : kontaktis la lokajn perantojn telefone.

Ansofi : aldonas ke La Sago estas la informilo de la asocio sed ke ne eblis aperiĝi kion la komitatoj deziris.

Vito : aldonas ke tiu rimarko estas kalumnia ĉar Serĝo klarigis ke la komitatoj ne sendis ĝustatempe la informojn sed li ne rifuzis aperiĝi iun informon.

Petro : proponas specialan laborkunsidon pri grupoj.

Maksimiliano : proponas ke la individuoj sendu informojn, eĉ samaj ĉe ĉiuj medioj, eĉ mallongaj, al La Sago, la Fejsbuka paĝo, la SAT-Amikara diskutlisto pri la lokaj agadoj.

*** 5) Pri La Sago

Ni ne ricevis raporton de la ĉefredaktoro, Serge Sire. Frue ekŝiginte el la sesmembra Komitato, li pli malfrue anoncis sian ekŝigon el sia posteno de ĉefredaktoro kun efiko la 31an de marto. Li klarigis kial en La Sago. Ni dankas nian kamaradon por la tuta pozitiva laboro, kiun li faris dum multaj jaroj por La Sago kaj por SAT-Amikaro. Nun necesas anstataŭigi lin. Ni ne scias, kiam la 121-a numero de La Sago aperos, sed ĝi certe havos ŝanĝitan aspekton.

Komitatoj : kiu deziras zorgi pri La Sago nuntempe, post la demisio de Serĝo ?

Vito : aldonas ke Serĝo raportis en La Sago kaj demandas al la komitatoj ĉu ili petis raporton de Serĝo ? Neniu postulis tion.

Ansofi : aldonas ke ŝi tre malfacile rilatis kun Serĝo.

Petro : ne utilis peti plian raporton de Serĝo.

Solange : ne favoris pri la ŝanĝo de la presisto. Ŝi ankaŭ parolas pri siaj malfacilaĵoj labori por SAT-Amikaro pasintjare.

Regis : bedaŭras la malĉeeston de Serĝo kaj diras ke nuntempe ni devus fari lian proceson. Li rimarkigas ke neniu de la Bordoza grupo ĉeestas por defendi sin. Por li kulpas la stultajoj de Serĝo.

Solange : mildigas tiun sintenon dirante ke por kvereli necesas esti almenaŭ du kaj ke verŝajne estas respondecoj ĉiuflanke.

Petro substrekas, ke kiel ni ĉiuj Serĝo laboris bonvolule. Asocio nur vane povas fari riproĉojn al bonvolulo. Ni nur devas danki Serĝon por la laboro, kiun li faris por SAT-Amikaro dum jaroj.

(NDLR) : Intertempe, Jean-Luc Ancey konsentas zorgi pri enpaĝigado de La Sago, kies korektanta skipo daŭre estas : Janine kaj Yannick Dumoulin, Lucette Echappé, Luc Gouverneur, Jacques Le Puil, Pierre Lévy.

*** 6) Pri agado en FEI (Franca Esperanto Instituto)

(raporto de Vinko Markovo por la jaro 2017-2018)

FEI estas lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro, je la dispono de



Pasantaj liceanoj el Dax vinis por kuniĝi al ni kaj entuziasmis pri la malkovro de esperanto.

ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio. Ĝi pretas helpi ne nur en okazigo de ekzamenoj, sed ankaŭ en lingva kontrolo de esperanto-tekstoj verkitaj de franclingvanoj, aŭ tradukitaj el la franca.

FEI-ekzamenojn trapasis 26 kandidatoj entute en Bouresse, Nantes, Marsejlo, Lillo kaj Mandres-les-Roses. Sukcesis : la unuagradan : 14 homoj : la duagradan : 11 homoj.

La studentaj verkoj por la Atesto pri Supera Lernado (komuna parto de la triagrada ekzameno, trapasenda antaŭ la fakaj branĉoj), daŭre estas :

La fotoalbumo (Trevor Steele)

Ĉu vi konas Blaise Cendrars ? (Manuel de Seabra)

Kredu min, Sinjorino (Cezaro Rossetti)

Ne ekzistas verdaj steloj (Liven Dek)

Ekzamen-sesio por la komuna trunko de la kapableco okazis en Parizo la 9-10an de decembro 2017, kun tri kandidatoj. Du

sukcesis.

La kampanjo pri « Espéranto au bac » estas en necerta situacio pro la anoncita malapero de tiu ĉi ekzameno en ĝia nuna formo. Tamen, ĝenerale enkonduko de Esperanto-instruado en la lernejo plu dependos de la intereso montrita de la lernantoj mem.

Estraro : mandatperiodo 2016-2019

Prezidanto : Vinko Markovo. Kasisto : Michel Dechy. Vic-sekretario : Didier Janot.

Ekzamena Komisiono : Renée Triolle (direktoro), Anne Jausions, Aleks André, Vinko Markovo.

Respondeculo pri la retejo : Pierre Dieumegard

Ceteraj membroj : Sylvain Barrier, Mirejo Grosjean, Maksimiliano Gverino, Christian Lavarenne, François Lo Jacomo.

Retejo : <<http://franca-esperanto-instituto.net>>, por pliaj informoj, intera-

lie datoj de venontaj ekzamensesioj kaj taskoj por memtrejniĝo.

Klaŭdo Roux demisiis, kaj Mirejo Grosjean ankaŭ pretas esti anstataŭita. Do, la kongreso klopodu trovi du novajn delegitojn. La tri aliaj delegitoj de SAT-Amikaro estas Pierre Dieumegard, Maksimiliano Gverino kaj Vinko Markovo.

Maksimiliano : aldonas ke la laboro ne estas peza por partopreni ĉe FEI kiel delegito.

Pierre D. : aldonas ke la abiturienta ekzameno ŝanĝiĝos kaj la projekto « espéranto au bac » verŝajne ne plu eblos. Li sendos demandojn al esperantistoj por plidensigi la dosieron sendotan al la ministroj.

Didier : proponas ke ni daŭrigu la laboron sub la nuna formo, ĉar jam ekzistas eblecoj por trapasi diversajn lingvajn ekzamenojn.

Ne okazis voĉdono dum tiu unua laborokunsido.



Jean-Manu estas filo de esperantistoj kaj gitaristo. Pere de helpantoj li lernis tri kanzonojn ĝuste por ni.



Paŭlino kaj Vito, kiuj registris la tutan interparoladon dum la tri tagoj. Antaŭ ili, Maksimiliano.

* Dua laborkunsido, dimanĉon posttagmeze, je la 14a

** Enkonduko

Prezidas Marcelle Provost.

** Unua tempo : Financa raporto

Ĉeestas ĝis 27 homoj en la salono.

Ansofi : prezentas tagordon : financa raporto, voĉdono pri agada kaj financa raporto. Poste prezento de Heleno pri la matene menciita libro. Poste Petro pri graveco de lokaj grupoj.

Financa raporto :

Gimo : Triope preparita (Solange, Veronik, Gimo), kontrolis François Degoul (dufoje ĉar estis eraro, retrovita kaj ĝustigita). Legebla en LS 120.

Libroservo : unu eldonaĵo (Dek du kugloj).

Revuo : malpli da elspezoj kompare kun 2016 pro malfruo de fakturoj (pagotaj en 2018).

Sidejo : pli da elspezoj pro sama kialo (ŝovitaj fakturoj).

En fako subvencioj, filmoj (DVD Esperanto) kaj vortaro varingjena donacitaj al kongresanoj, interalie UEA-anoj.

Repago de asekuro pri inundo malnova.

Bonvolemo : granda parto de la spezoj. Gravaj montri tion por peto de subvencioj por kongresoj.

Libroservo : de 2 jaroj denove rekresko de la vendoj.

Membraro rekreskas en 2017 ĝis preskaŭ 200 membroj.

Didier : demandas kiel estis la membrara evoluo antaŭ 2004.

Gimo : ni ne scias, mankas informoj. Kialoj de malkresko verŝajne estas miksaĵo de multaj faktoroj, sed antaŭ kelkaj jaroj la averaĝa aĝo de nia membraro estis 70...

Pri la « mita riĉeco de SAT-Amikaro » aludita p. 3 de LS 120, Gimo substrekas kiom relativa tio estas (por multaj laboristoj, tiu sumo estas granda, sed se ni komparas nin kun borsaj entreprenoj de CAC 40, ĝi estas mizere malriĉa...).

La Francia kontado devigas subtaksi la valoron de la konstruaĵoj, do kio aperas

kiel 60 000 verŝajne reale valoras 400 000 aŭ 500 000.

Gimo proponas konsideri ke la pruntedono al SAT-EFK pri la filmo, kiu nun ne plu vendiĝos multe (ĝiaj bildoj datumas de 2010...) estu nuligita.

Iuj fakturoj pendas nepagite (interalie fakturo de Esperanto France)... Pro manko de fortoj por repeti kaj rerepeti pagon. Iuj libroj konsidereblas ne plu vendeblaj (ekz GDFE de Varingjeno restas je 4000 ekzempleroj).

Ŝuldo estas ĉefe al SAT (fakturo ricevita malfrue en la jaro).

Gimo ja daŭre opinias, ke SAT-Amikaro estas sufiĉe riĉa asocio. Tamen ĝi estas malriĉa je bonvolemoj kaj membroj, ni ege bezonas novajn anojn kaj bonvolemojn por agadi.

Rezultoj preskaŭ ĉiam negativaj ekde 2010.

François Degoul : raportas pri sia kontrolado kaj ke en dua kontrolo postrestis malgranda malkongruaĵo (89 €) kiun li konsideris ne grava kaj do aprobenda. Rimarkigis ankaŭ alian etan malkongruaĵon pri kiu Gimo klarigis.

Lumeto : demandas pri detaloj de spezoj

rilate al solidarkaso.

Gimo : respondas, ke solidarkaso uziĝas por pagi kotizojn de precipe afrikanoj kaj ebligigi nepagipovajn kamaradojn partopreni kongreson.

Voĉdono pri agadraporto : el 27 membroj 22 Por, 0 Kontraŭ, 5 Sindetenoj.

Voĉdono pri financa raporto : el 27 membroj 25 Por, 0 Kontraŭ, 2 Sindetenoj.

**** Dua tempo : prezento de la infanlibro, kiun SAT-Amikaro povus eldoni**

Ĉeestas 34 homoj.

Hélène Cordeau – filino de Bob ; fondinto de ILO - prezentas libran projekton « La potion à rêve ».

Ŝi skribis tiun libron 10 jarojn antaŭe. La libro estis tradukita de ILO en esperanton.

La propono estas ke SAT-Amikaro eldonu la libron.

Ansofi : diras ke tiu libro utilos al la infanoj kaj al la plenkreskulaj komencantoj.

Bertrand : kompletigas la argumentojn por eldoni ĝin en esperanto dirante ke ĝi interesus neesperantistojn pro la beleco de la desegnoj kaj de la koloroj. Favoras do ke ĝi troviĝu en franclingvaj infanlibraj bretaroj kaj tiel ebligus konigi Esperanton al ekstera publiko.

Elizabet : aldonas ke la familioj kiuj enhavas denaskajn infanojn serĉas avidite tiajn librojn.

Vito : aldonas ke SAT-Amikaro povas eldoni la libron sed gravas ĉefe kiel ni diskonigas ĝin.

Veronik : konfirmas ke nuntempe la malfacilo estas kiel akceptigi SAT-Amikarajn librojn al la klasikaj librovendejoj.

Frank : proponas kuneldoni la libron : SAT-Amikaro kaj iu infanlibr-eldonservo.

Solange : deziras scii kiom kostos la libro kaj opinias ke ni devas pripensi la aferon antaŭ voĉdono por aŭ kontraŭ la propono. Findecido estas lasita al la komitato.

**** Tria tempo : Rilatoj inter SAT-Amikaro, lokaj grupoj kaj SAT**

Petro : La laborista esperanto-movado estas unueca. La ĝenerala laborista kultura celo kaj la lingvo unuigas ĝin. Granda divido por dispartigo de taskoj estas inter por- kaj per-esperanta fakoj. Per-esperanta estas SAT, tutmonda. Por-esperanta estas LEAoj (Laboristaj Esperanto-Asocioj) : SAT-Amikaro, SATEB, SATEH, SLEA... ligitaj kun SAT per la Gottenburga konvencio. Tiu ĉi notinde tekstas :

« 1. konsiderante, ke la nacilingvaj esperanto-asocioj kvazaŭ formas la rezervujon por la tutmonda esperanto-asocio (SAT), ĉiu laborista esperantisto klopodu, ke la interrilatoj estu la plej intimaj inter ambaŭ organizoj.

2. Ĉar la taskoj inter ambaŭ organizoj estas malsamaj, necesas, por eviti konfliktojn, ke SAT principe plenumu la taskon de peresperanta laboro kaj la landaj asocioj principe tiun de poresperanta laboro. »

Laborista esperantisto estas en la centro

kaj zorgas kaj pri peresperanta kaj pri poresperanta agado. Tiu individua membro ekzemple zorgas, ke neniu tasko estu neglektata ĉar oni povas dubi pri tio, ĉu ĝi estas peresperanta aŭ poresperanta. Lokaj grupoj estas grupoj de individuaj membroj loĝantaj proksime en iu urbo, regiono aŭ partoprenanta en komuna retlisto. Ilia tasko estas regule kunveni loke, organizi kursojn, rilati loke kun aliaj organizoj ne nepre nur esperantistaj (urbestraroj, sindikatoj, politikaj partioj, kooperativoj, diversaj grupoj kiel veganoj, pacistoj, ekologiistoj, ludaj kluboj, sportaj asocioj, lokaj bibliotekoj, ĝemelaj urboj ktp). Unuvorte malfermi sin al la loka vivo kaj partopreni en ĝi.

Iuj diras : « Nia grupo estas sendependa, ni ne bezonas rilati kun SAT aŭ SAT-Amikaro. » La grupoj efektive estas sendependaj en la senco, ke ili suverene organizas sin kaj decidas por si mem pri sia poresperanta (ekzemple SAT-Amikara) kaj peresperanta (SAT-a) agado. Por eldoni lernolibrojn, literaturon, ktp, rilati kun aliaj grupoj, kun aliaj landoj, utilas LEAoj kaj SAT. Tial ne LEA-oj kaj SAT kreis kaj regas grupojn, sed male la grupoj kreis la LEA-ojn kaj SAT por sia servo.

Vito : mencias ke diferenco inter teorio kaj realo estas ke nuntempe restas iom de la LEAoj SAT-Amikaro, sed preskaŭ neniam da lokaj grupoj (konas nur la Parizan, petis pri aliaj grupoj ĉi matene sed ne ricevis respondon).

Petro : ...[interrompita, ne respondas la demandon : vidu poste]

Ansofi : havas impreson ke ŝi ne estis bone komprenita kiam ŝi venigis aŭtorinon de infanlibro. Ŝia loka grupo estas ILO, ŝi membras en SAT kaj SAT-Amikaro. Instruas dufoje semajne kun komencantoj kaj tradukemuloj, renkontas homojn. Pluraj estas membroj de SAT-Amikaro kaj de SAT, aliaj estas nur SAT-Amikaranoj. Bezonas materialon, kiu estas akirebla ĉe SAT-Amikaro. Bezonas la forton de SAT-Amikaro por eldoni la infanlibron ĉar ĝi postulas tro grandan buĝeton. Ĉar la libro estas dulingva, ĝi ne konvenas por SAT-eldono, sed por SAT-Amikara

jes.

Didier : Rilate La Sagon, ĉu ĝi estas poresperanta, aŭ per-esperanta gazeto ?

Petro : principe ĝi estas por-esperanta ĉar tia estas SAT-Amikaro. La praktiko povas esti iom alia.

Izabel Lamy-Rested : Ĉu La Sago povas esti ilo por allogi ĉiujn al Esperanto ? Propagandilo por Esperanto ?

Petro : Mi kiel SAT-ano ne deziras logi iun. Kiam mi estis juna, la provoj logi min igis min tuj forkuri. Mi deziras per konvinko varbi raciemojn.

Poresperanta fako (LEA, SAT-Amikaro) de la laborista Esperanto-movado celas disvastigi Esperanton en popolaj medioj kaj varbi al SAT. Por la unua celo ĝi ne konkurencas al la neŭtrala movado sed kunlaboras kun ĝi. Por varbi al SAT ĝi principe kunlaboras kun sekcioj (= fakoj) kaj frakcioj de SAT. En la lokaj grupoj SAT-anoj kaj SAT-Amikaranoj (laŭ statuta rekomendo, ofte samaj homoj) principe kunigas la por- kaj peresperantan laboron kaj precipe por laboristaj celoj rilatas kun aliaj esperantistoj kaj kun neesperantistoj. De la membroj en la kadro de la statuto dependas, ke, por kiu kaj por kiu celo La Sago estu alloga.

Ansofi : La Sago povus esti alloga. Ĝi estas la gazeto de la membroj. Tiuj povas informi, ĝi do estas ilo por la membroj de SAT-Amikaro.

Iza : Ĉu por ne membroj-neesperantistoj, se ni lasas ĝin al vido ĉe dentista atendejo, ĝi allogas ?

Ansofi : Ni faru la neceson por igi ĝin alloga se ni deziras tion.

Jocelyne : Mi demandas min ĉu La Sago estas propagandilo. Ilo de SAT-Amikaro, jes, sed kiu decidis kion ni metas en La Sago ? Ĉu referendum, ĉu komitato decidus ? Ĉu ni devas ion skribi en la franca en la revuo ?

Didiero : Ĉu La Sago estas por la membroj aŭ por informi nemembrojn pri Esperanto kaj diversaj aferoj ? Novuloj nun ankaŭ multe legas rete, do ni devas adapti ankaŭ la formaton.

Deniz : Ĉe fervojistoj ni partigas la revuon al fr/eo pli/malpli duone.

Vito : Jam farita debato de 10 jaroj dum



Tre varmkora etoso ĉe la fino de la koncerto.

SAT-Amikaraj kongresoj, la ĉefa afero estas provizi materialon, kaj la revuo konsistas el tio kio estas sendita al redaktejo. Preskaŭ neniam estis rifuzita materialo. Kiu volas vidi ion aperigita, tiu ĝin simple sendu !

Petro : kompletigas sian prezenton (vidu supre) per prezento de SAT-rondo. SAT-rondo konsistas el SAT-anoj loĝantaj en sama loko. Ĝi kunlaboras kun samloka grupo de SAT-Amikaro. Dezirinde estas, ke samlokaj SAT-rondo kaj grupo de SAT-Amikaro konsistu el la samaj membroj. Petro konas preskaŭ nur unu, tiun de Parizo. Alia virtuala, estas tiu de Ipernio, sed en ĝi jam de longe neniu esprimiĝas. El vidpunkto de demokratio, la asocion regas la individuaj membroj. En iu fako, ĉiuj subgrupoj (SAT-anoj, SAT-Amikaranoj) estas suverenaj por si mem.

Ansofi : Alia ilo ol La Sago estas la libroservo, kiu utilas al la membroj por ilia ĉiutaga vivo.

Veronik : Ne rekandidatos por tiu posteno post la fino de la jaro, sed daŭrigas ĝis fino de 2018.

Ansofi : Deziras pli da homoj en la komitato. La respondeculoj de La Sago kaj de la libroservo estu en la komitato por havi akurate la informojn. Eblas ĝis 10 homoj en la komitato.

Veronik : Pasintjare deklaris ke ŝi laboris 1000 horojn (duontempa laboro, 20 horojn semajne) por la libroservo : aĉeti librojn por renovigi la stokon, respondi demandojn de homoj, partopreni al eldono

de libroj, zorgi pri la stoko (kio estas kie). Skipa laboro. Vendrede okazas la sendoj el la sidejo. Lucien, kaj Regis zorgas pri la enpakigo kaj sendo (antaŭe ankaŭ Fil Guichet sed nun ne plu ĉar tro malsana). Jarfine zorgi pri la kontoj, prepari tabelojn.

Regis : Anoncas ke ne li anstataŭos Veronikon. Ne prenos la respondecon administrati la libroservon.

Didier : Kiu zorgas pri la retejo ?

Veronik : Zorgas pri parto de la retejo.

Vito : Partopreniga retejo, kiu ebligas kunlaboradon de ĉiuj membroj, kiuj pretas kontribui. Ne necesas teknika kompetenteco, oni povas simple alŝuti krudan materialon (tekstan, bildan) kaj aliaj kamaradoj pli certaj povas zorgi pri la plibeligo prezenta.

**** Kvara tempo : prezento de la fondaĵo « Pierre Besnard »**

Frank Mintz : Retejo ekzistanta ekde novembro 2005. La nomo aludas anarkisindikatismon de la 30aj jaroj. Ĝi prezentas materialon de laborista revolucia movado, historia.

La dokumentoj estas hispane kaj france. 3000 dokumentoj aktuale. Devas esti komprenebla : simpla paĝo, broŝuro, libro. 64 libroj de argentina eldono « Utopia ».

Konkrete, rilato kun Esperanto estas la problemo de la lingvo en laborista mova-

do. Ĝi ekzistas ekde 1868, kongreso de AIT en Bruselo : kiu lingvo povas konekti laboristojn de ĉiuj landoj ?

2002, kongreso de Eseno « Solidarity and the languages problem ». [Sekvas aliaj ekzemploj]

Majo de 2017 (100 jariĝo de rusa revolucio) : la fondaĵo havas unuafoje artikolon en Eo : kial oni ne trovas la sepultejojn de la Esperantisto Andres Nin ? Morto de Andreo Nin en majo 1937 estas interesa pro la sekvoj de rusa revolucio en Hispanio.

Lanti : ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetunio ? 1935. Kritikoj de Lanti riveliĝas ĝustaj laŭ la dokumentoj kiujn ni disponas nun.

Ankaŭ broŝuroj de Ĝilberto Ledon, SAT-ano kiu vivis en Brazilo.

Vjeko : demandas ĉu Hispana revolucio estas Intercivitana milito de 1936-39 ?

Frank : respondas ke li celis precipe la revolucion de la hispanaj revoluciaj esperantistoj (Nin, Mangada...)

Vjeko : parolas pri la homoj kiuj partoprenis en Internaciaj Brigadoj el eksterlando. Pri multaj ankoraŭ ne scieblas kie ili estis enterigitaj, ekzemple Frederiko G. Lorca kaj aliaj.

Frank : Oficiale 5 000 sepultejoj kompare kun 90 000 kadavroj oficiale.

Ani : Tasko de LEA povus esti traduki dokumentojn el tiu fondaĵo.



Michel Dechy



Hélène Cordeau

*** Laborkunsido Lunde la 2an de Aprilo**

**** enkonduko**

22 homoj ĉeestas. Prezidas Françoise Guihaumé

**** Unua tempo : Filmo « Esperanto » de Dominique Gautier.**

Restas 1000 DVD kaj ĉiuj kongresanoj ri-

cevos po unu.

Ansofi : demandas kiel la homoj uzas la filmon.

Annie : montris la filmon dum SEL-kunsido en Belforto. 20 homoj ĉeestis.

Pierre : aĉetis plurajn por publike montri.

Jocelyne : same. Ŝi provis ĉe multaj asocioj kaj maldekstraj medioj sed ricevis multe da rifuzoj.

Vito : Marcelo prezentos la filmon dum la Jubileo en Bordojo dum sindikata kleriga sesio.

Pierre : malfacilas prezenti la filmon en

lernejoj pro la longeco de la filmo.

Lumeto : provis ĉe multaj lokoj sed ricevis malsukcesojn.

Paŭlino : Esperanto-Angers projekciis la filmon dum evento organizita de la liceanoj « Les Renoiriennes », entute, kaj poste okazis debato. Esperanto-Angers estos denove invitita al tiu evento ĉi jare.

**** Dua tempo : Al la junuloj !**

*** Buro :

Raportas Vito : Ni prezentis la teknikan parton de la projekto, kaj kiel okazas la lukto. Ĉiu povas siaskale kontribui al tiu ĉi lukto : uzante la elektran provizon de Enercoop, informi pri la projekto kaj li proponas, ke SAT-Amikaro aliĝu al Enercoop por konkrete subteni la batalon.

Petro : necesas trovi alternativan solvon. Kiu solvo estas proponita ? Kion fari de la rubaĵoj ?

Paŭlino : respondas ke la rubaĵoj nunaj estus lasitaj surloke kiel en Ĉernobilo.

Ansofi : pri aliĝo al Enercoop, ni ne povas abrupte decidi. Ni devas studi la aferon.

Vito : jes, referendumo estas nepre, tion li proponis, ne ke komitato abrupte decidus sole.

Paŭlino : la kosto ne estas multe pli ol Enedis.

Regis : ĉu ni bone regas la konsumon de elektro kaj gaso ?

Solanĝo : konsentus pri la ŝanĝo kaj « la homoj kiuj iras al la sidejo devas atenti pri konsumo ».

Regis : Neniu deziras zorgi pri tio.

Ĵoslino : Ni decidis eniri la NEF, do same por Enercoop.

Regis : Paroli pri la sidejo ankaŭ gravas.

Voĉdono. Ĉu aliĝi al ne nuklea energio ?

Sindetenas : 2, kontraŭas : 0, akceptas : 20. Do aprobata.

*** Sociaj retoj :

Raportas Lumeto (resumas Maksimilianan prelegon) : Ĉiuj povas vidi la Fejsbukon paŝon sen nepre aliĝi. Maksimiliano proponas ke homoj sendu al li videojn de malpli ol 10 min. Ankaŭ simplajn informojn. Ĉar ju pli oni aldonas aĵojn, des pli la informoj disvolviĝas.

Paŭlino : oni devas krei konton por povi « ŝati » kaj sendi la informojn dulingve.

Flonjo : Maksimilian bezonas almenaŭ 4 informojn semajne por ke la paĝo estu videbla, kun fotoj. La informoj nur en esperanto povas esti senditaj nur esperante. Kaj pri la ne nur esperantaj eventoj, dulingve estus pli taŭge.

*** Al la junuloj :

Raportas Lumeto : Laboris tra la ĵurnalo Ouest-France en kiu ŝi trovis demandojn faritajn al la junuloj. Kun Agnès, ili pensis uzi tiun modelon esperante. Ili intervjuis adoleskantojn en Greziljono por krei specifan paŝon en La Sago. La rezulto estis duonkontentiga.

Regis : Pensas ke la projekto estis vana.

Marcelle : junulo 18-jaraĝa estis interesiata pri la simpleco de la lingvo. Ĉu ni havas homforton por tiel varbi ĉe la junuloj kaj ĉu tio valoras ?

Lumeto : la junuloj nur uzas senĉese la lertajn telefonojn.

Vito : estas kontraŭ aĝismo. La junuloj kiuj deziras trovi informojn trovas tiujn kiam ili bezonas, se ni disponigas ilin klare kaj atingeble. Se ni faras nian laboron laŭ la statuto, normale ili povas mem varbiĝi el la materialo, kiun ni proponas (lernolibroj, literaturo, revuoj, kursoj, retejo...)

Anino : kion farus ŝia nepo dum kongreso kiel tiu ĉi de SAT-Amikaro ? Ni devus proponi ion por ke la junuloj povu lerni dum la kongresoj.



Kelkaj kongresanoj elektantaj librojn inter tiuj de la libroservo.

Ansofi : konsentas kun Vito, ke se la temoj kiujn ni pritraktas estas interesaj, la junuloj alvenos. Kiel per la libro de Heleño proponita al eldonservo hieraŭ. Tial ŝi ĝin proponis kaj deziras ke ni decidu ĉu la asocio akceptas ĝin eldoni aŭ ne.

Solange : ĉu la homoj estas pretaj elspezi por havi pli da infanlibroj ?

Ansofi : proponas antaŭaĉeti por certigi la neperdon de mono.

Flonjo : la celo ne estas gajni monon sed varbi esperanton tra tiu libro.

Didiero : eldoni librojn facilas sed vendi ilin malpli.

Anino : iu proponis partoprenigan financadon per Ulule (kiu, ĉar ni estas asekurita ĉe MAIF, ebligus havi duoble pli da financoj ol la sumo rikoltita).

Ansofi : proponas ke la kongreso instigu la eldonon de la libro.

Petro : antaŭmendas 2 librojn.

Frank : alia propono : krei komisionon speciale por taksu ĉu eblas aŭ ne.

Anmario : la Dijonanoj informos kiel ili faris por eldoni « La Sekreto de la strigo de Dijono ».

Solange : antaŭfakturo prezentas ke ni devos vendi la libron 20 eŭrojn almenaŭ. Malfacilas vendi ĝin kompare al la ĉinaj libroj kiuj kostas 2 aŭ 3 eŭrojn.

Paŭlino : laŭ ŝi, la debato ne utilas ĉar la propono estas nur ke la komitato riprenu la aferon, ne estas devigo nun decidi.

Flonjo : propono pli simpla : ke la komitato eldonu la libron kun alia eldonservo se bezonos.

Lumeto : ke la libro estu PDFe proponita.

Regis : ke la komitato decidu.

*** Lokaj grupoj :

Raportas Regis : La pariza grupo organizas ĉiusemajne babilrondon. Ĝi bone funkcias, demokrate. Regis, Erik kaj Abdel zorgas pri ĝi. Ili intencas malfermi la babilrondon al eksterparizanoj per uzado de skajpo. Ili bezonas monon por aĉeti komputilon.

Lumeto : demandas kiu decidus ĉe la pariza grupo. Kiu rolas kiel peranto ?

Erik : iu povus esti dungita por zorgi pri la sidejo.

Poste raportas Françoise,

Vito : Françoise devas esti la sola decidanto de la kunveno kiel prezidanto, ne la aliaj komitatoj.

Jocelyne : demandas ĉu ni parolos pri La Sago kaj la libroservo, pri kiuj anstataŭos Serĝon kaj Veronikon ?

*** Dungado de Izabelo Nikolao (Isabelle Nicolas) dum unu posttagmezo semajne :

Lumeto : Izabel gastigas la vizitantojn, rilatas kun liceoj kaj mezlernejoj por varbi al esperanto, respondas al la telefonalkvokoj.

Izabel : « Neniu liceo respondis. Merkrede liceoj estas ne facile atingeblaj. Mi skribas agadjurnalon. Mi skribis ideojn por proponi al la asocio. »

Ansofi : Izabel helpas pri la libroservo, ne respondecas pri tiu servo.

*** Libroservo :

Ansofi : Kiu dezirus anstataŭi Veronikon fine de la jaro ?

Vito : la laboro povas esti farata de iu profesiulo se neniu el la asocio volontule proponiĝas.

Flonjo : « Kiom da tempo la profesiulo estus pagita kaj kiom da mono li/ŝi estus pagita ? Kiel ? Mi estus interesata se mi povus esti pagata kontrakte unu tagon semajne. »

Solange : Kiam iu estas salajrata, ankaŭ ŝarĝoj devas esti pagataj. Asociaj ĉekoj ekzistas. Tiuj ĉekoj estas proponitaj de la socia asekuro.

La Sago : Neniu solvo estas proponita. Lumeto asertas, ke ĝi tamen aperos baldaŭ.

Prezentas la venontan SAT-Amikaran kongreson en Montluçon Daniel Lachasagne.

Prezentas la venontan SAT-kongreson en Kragujevac Vito el bildprezento sendita de Vinko.

LibroServo

SAT-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
Vendrede 10:00-16:00 Sabate 15:00-18:00

Telefono : (033) 09 53 50 99 58

Retadreso : libroservo@sat-amikaro.org

Eblas mendi telefone (eblas lasi mesaĝon, ni realvokos vin) aŭ rete.

Commande possible par téléphone ou par courriel.

CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G

Pri la sendokosto, ni uzas la francan poŝtan tarifon, pli bone informiĝi, des pli se vi mendas plurajn librojn, se vi mendas eksterfrancien...

Pli pri niaj eldonoj <http://www.sat-amikaro.org/spip.php?article2104> >

Boutique > Livres > Nos éditions

Pli pri la novaĵoj en la katalogo de la libroservo

<http://www.sat-amikaro.org/spip.php?rubrique229> >

Boutique > Livres > Nouveautés

Libro vendejo rete :

<http://www.esperanto-sat.info/rubrique125.html>

<http://www.satesperanto.org/eldonkooperoativo/>

Horaro bd Vincent Auriol

<http://www.sat-amikaro.org/article1441.html>

Notre catalogue <http://www.sat-amikaro.org/spip.php?rubrique125>

Supre kaj dekstere kuŝas liston de kelkaj titoloj eldonitaj de SAT-Amikaro, SAT kaj SAT-EFK.



La Nebulozo de Andromedo

Fama scienc-fikcia romano verkita en la 1950aj jaroj de aŭtoro kiun oni konsideras la patro de la scienc-fikcia ĝenro en Rusio.

Aŭtoro Ivan Efremov

ISBN/ISSN 9782918300243

Formato 403 paĝoj, 21 cm


Prezo 23,10 €

Eldonloko, jaro Embres-et-Castelmaure, 2010

Eldoninto MAS

Elrusigis J. Finkel

	Eldono	Prezo	Sendo
Dictionnaire de poche	SAT-Amikaro	4,00	1,56
Dictionnaire pratique	SAT-Amikaro	16,00	7,00
Grand Dictionnaire Esperanto-Français (Warengien)	SAT-Amikaro	10,00	7,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto PIV 2005	SAT	60,00	7,00
Teknika Vortaro de Greziljono	SAT-Amikaro	18,00	4,80
Français-Espéranto Espéranto-Français			
Kiel traduki (80 franglingvajn vortojn kaj kiel esperantigi proprajn nomojn)	SAT-Amikaro	12,00	4,80
Cours rationnel	SAT-Amikaro	10,00	3,12
Espéranto éclair - Découverte de la langue internationale auxiliaire R. Gueguen	SAT-Amikaro	4,00	3,12
Antaŭ unu jarcento la granda milito kaj Esperanto	SAT-EFK	14,00	7,00
Anarkio Errico Malatesta	SAT-EFK	5,00	3,12
Petite grammaire de l'espéranto règles et application	SAT-Amikaro	6,00	3,12
Claude Gerlat 87 pages			
Jules Verne espérantiste ! / Jules Verne esperantisto !	SAT-Amikaro	8,00	3,12
2014 3e édition L. Dupuy trad. A. Lequint k. J. Le Puil			
Dekdu kugloj breloke montitaj – Douze balles montées en breloque	SAT-Amikaro	5,00	3,12
L. Guilloux trad. P. Adeline			
Plano B Mobilizo por savi civilizacion L. R. Brown	SAT-EFK	18,00	7,00
Karotkapo J. Renard' trad. ILO	SAT-EFK	2,00	1,56
Indignu S. Hessel trad. Diversaj	SAT-EFK	3,00	1,56



La eksperimento. La forgesita revolucio de Kartvelujo 1918 – 1921

verkis : Eric Lee

Tradukita el la angla de Renato Corsetti k.a.

eldonita de Monda Asembleo Socia (MAS) 2018

ISBN 978-2-36960-117-3

246 paĝa, formato : 140 x 216 mm

Prezo : 13 €

Eric Lee estas ĵurnalisto kaj historiisto kiu pasigis pli ol tridek jarojn esplorante la sendependan Kartvelujon kaj li estis aktiva en sindikataj kaj politikaj bataloj kaj en Usono kaj en Britujo.

Nikolao Gudskov : Recenzo de la libro de Eric Lee, « La eksperimento. La forgesita revolucio de Kartvelujo 1918-1921 ».

Kartvelio 1918-1921 kiel nova mito pri « ora epoko »

La libro de Eric Lee « La eksperimento. La forgesita revolucio de Kartvelujo 1918-1921 » traktas kelkajn diversgrade forgesitajn historiajn eventojn el la epokoj de la 1a kaj 2a Rusaj revolucioj. La centro de la libro estas dediĉita al la

memstara Kartvela popola respubliko dum la dua Rusa revolucio, kiun la aŭtoro opinias la plej aŭtentika ekzemplo de demokratia socialismo dum la tuta homara historio. Pri tio ni parolu pli detale, sed multe pli forgesita nuntempe estas alia epizodo, kiun la aŭtoro konsideras provludo al la ĉefaj eventoj – Gurgia respubliko, t.e. teritorio de popola memregado en unu distrikto de Kartvelio dum la unua Rusa revolucio.

Eblas legi pli <http://mas-eo.org/spip.php?article631> de Nikolao Gudskov.



La Sekreto de la strigo de Dijono

ISBN 978-2-95556473-3-2

verkis M. Lautrou, J-F. Drouin Trad. O. Buisson 25 paĝa 220 gr

Prezo 10,00 €

eldonis « Éditions Graine de Moutard »

bindita, formato : 190 * 190 mm

ekde tri jaraĝa...

Tiu porinfana libro estas eldonita en kvar lingvoj (franca, angla, germana, esperanta).

Ĝi ricevis premion en la belartaj konkursoj de UEA (2017).

Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara-kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro ! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj ? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin ? Malfacila tasko ! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Morto de artisto, romano de Anna Löwenstein, FEL 2008, 620 paĝoj.

Mi havis la ŝancon ĉeesti la prezenton de tiu ĉi romano far la aŭtoro, en la IF en Duseldorfo. Kaj multon pri Nerono mi malkovris !

La Artisto, Prokulpio estas komikisto kaj sklavo. Infanaĝe Nerono amikiĝas kun li. Ili kune iras al banejo, al bordejoj. Nur 16-jara Nerono iĝas imperiestro, sed li ne forgesas sian junan amikon. Iun vesperon, post kantprezentado, kiun Nerono tre ŝatas, ĉi-tiu frue forlasas siajn amikojn, kiuj miras. « *La plej ĝena flanko pri la imperiestriĝo estas ke necesas leviĝi tiel frue matene* », diras Nerono ! Li jam bele ludas liron kaj baldaŭ publike kantas kaj akompanos sin per citro, pli rafinita instrumento. Prokulpion malsklavigas Nerono. Kaj la komikisto ricevos donace vilaon. Li iĝos la ĉefa organizanto de grandaj spektakloj.

Nerono mortigas sian edzinon, Oktavian, nur 22-jaran, neniu estas perfekta ! 25-jara li aktoradas, ludas Aĥilon de Enio. Ni troviĝas iom post la duono de l' romano, kaj malgraŭ la emo de Nerono por muziko, teatro kaj arto ĝenerale, ni scias ke venos la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.



Anna Löwenstein.

Ni estas nun iom post la duono de l' romano. Kio okazos nun ? Kompreneble la fajrego en Romo. « *Oni ekparolas pri la fajrigistoj, membroj de sekto, kiuj volas faligi la imperion* » iu diras. Senecio raportas, ke « *Iu diras ke la imperiestro mem ekbruligis la fajregon.* » « *Tiu sugesto ne meritis ricevi eĉan respondon.* » diras Prokulpio (mi tre ŝatas tiun « eĉan » !). Por silentigi tiujn dirojn oni mortigos centojn da kristanoj en la cirko dum tri tagoj. Leonoj, tigroj, hundoj, torĉoj ! Venos komploto kontraŭ Nerono, multaj gravuloj estos mortigitaj. Aĉaj orgioj en Neapolo (ne aĉaj ĉar orgiaj, sed ĉar sklavo devas submetiĝi !).

Nerono iĝas pli kaj pli tiraneca. Paranojulo, li mortigas siajn eksamikojn.

Megalomaniulo, li kredas sin la plej granda poeto, aktoro, muzikisto... eĉ dancisto ! Sed ĉion tion kaj la sekvon ĝis la morto de Nerono, vi povas legi en iu ajn enciklopedio... Ĉu do vere necesis 600 paĝoj por prezenti al ni frenezulon ? Jes kaj ne. Ne ĉar mi ĉiam miras, ke homoj sentas la bezonon verkadi pri pli ol konata temo. Jes, se oni konsideras, ke Anna Löwenstein estas brila rakontisto.

Amuzis min la « Klarigoj pri la traduko ». Anna skribas : « *Por ambaŭ libroj (la alia estas la Ŝtona Urbo) mi uzis la saman kriterion : tio estas, ke mi laŭeble uzis nur Fundamentan kaj oficialigitan vortprovizon.... Tamen, tradukante mian romanon mi kelkfoje bezonis vorton, kiu neniam estis oficialigita.* » Kaj sekvas listo de preskaŭ cent vortoj ! Jen *kaco* (peniso), *fiki* (sekskuniĝi), *pugo* (postaĵo), *kojono* (testiko), *deprimi* (senenergiigi, malvigligi, senkuraĝigi), *refreno* (rekantaĵo), *vori* (krude manĝi)... Ja ĉiuj tiuj vortoj, el kiuj strange nur du adjektivoj, estas komunuzaj ! Do kial ne akcepti tiujn aliajn adjektivojn, kiuj ofte malpezigas la stilon, i.a. : linda, lanta, poka, mava, groba, olda, leĝera, ĉipa, dista, fragila, friska, gemuta, hida, lasciva, lotana, loza, minca, pimpa, pita, streta, superba, svaga ? Ĉu nur la sinonimoj de malvortoj eŭropigus Esperanton ? Mi konfesas, ke respondo mi ne havas ! Sed daŭre uzos la parojn beleta kaj linda, malami kaj hati, maljuna kaj olda, kruda kaj groba, malmultekosta kaj ĉipa, malbelega kaj hida, ktp kaj eĉ kotopo !

Post *la Ŝtona Urbo*, jen sendube nova romano de Anna Löwenstein kiu ankaŭ furoros...


Ĵak Le Pul

Krucenigmo : Birdoj

La solvo lokiĝas en la paĝo 18.

- a) Nigra birdo kun flava beko, kiu bele fajfas.
- b) Rukulantaj birdoj, kiuj vivas pare.
- c) La plej kutima birdo el la birdokorto.
- ĉ) Multkolora birdo kun belaj bluaj plumoj.
- d) Tre komunaj birdoj kiuj vivas grupe.
- e) Akvobirdo kun tufo da surkapaj plumoj.
- f) Tre bela verda lazura birdo, kiu fulme plonĝas por fiŝkapti.

- 1) Birdo vivanta en la kamparo aŭ bredata por siaj viando kaj ovojn.
- 2) Batalema birdo tre kutima en la ĝardeno.
- 3) Birdo plejofte urba, mesaĝportanto, do praulo de la reto.
- 4) Tiu birdo simbolas gajecon en la franca.
- 5) Blanka kaj nigra, rabema birdo.
- 6) Onklo de Riri, Fifi kaj Lulu.



La metiejo de « La Bergerette » : laborejo por reutiligado

Ekde kiam mi emeritiĝis, mi ekkutimis memvole helpi ĉiujn en specifa najbara metiejo, « Les Ateliers de la Bergerette », kies ĉefa celo estas reutiligi forĵetaĵojn.

Fakte, pere de la nocio de protektado de la natura medio, iom post iom jam de kelkaj jardekoj naskiĝis kaj disvolviĝis novaj fakoj, novaj produktoteknikoj, novaj metioj. Sekve al tio ekaperas aro da freŝdataj specifaj terminoj en la profesia kaj publika vivo : poluado, daŭra disvolviĝado, spurebleco, speciga elekto (1), forĵetaĵejo, reutiligado, k.t.p.

« Les Ateliers de la Bergerette » estis fonditaj jam de tri jardekoj fare de kuraĝaj aktivuloj, kiuj interesiĝis pri ekologio, kiam tiu nocio ĵusjuse ekestis laŭmoda. Kadre de alternativa ekonomio, laŭ la fama statuto de asocio « leĝo de 1901 », ili klopodas pluki malnovajn objektojn donitajn de loĝantoj aŭ de firmaoj, aŭ devenantajn el najbaraj forĵetaĵejoj, celante ĉu vendi tiujn objektojn kiel brokantaĵojn, ĉu transvendi ilin kiel krudajn materialojn al industriaj negociistoj (maltaŭge nomitaj « ferrubistoj »). Tiele agas la plejmulto el la komunumoj « Emmaüs », sed por malsama celo ; ĉitie, la ekologiemoj strebas « doni duan vivon al objektoj », aŭ ebligi la reuzon de



krudaj materialoj, anstataŭ ol aĉe kaj malŝpare disĵeti ilin en sovaĝan naturon. Iom post iom, ili sukcesis profesiigi kaj akiri modestajn salajrojn ; kaj eĉ propagandi sian socieman mision.

Jen en la vilaĝo Thieuloy-Saint-Antoine la metiejo, kie mi (kiel volontulo kun ankaŭ kelkaj aliaj) priservas, dungis tri salajrulojn. Kadre de specifa kontrakto, ĝi funkcias sine de la « Komunumaro de Verda Pikardio » (2) ; tiu regiona institucio, speco de distrikteto ariganta centon da ruraj municipoj nord-okcidente de Beauvais, rajtas kolekti imposton. Tio ebligas ĝin investi grandskale, ekzemple aĉeti industriajn sidejojn. Tiel, nia metiejo sidas en praa fabriko modeste freŝnormigita, taŭga por nia aktiveco : jen halo kun kajo por ricevi la varojn, jen laborejo por ekzameni kaj dispartigi ilin (ĉu brokantaĵojn,



Nia metiejo sidas en praa fabriko modeste freŝnormigita, taŭga por nia aktiveco.

ĉu krudan materialon, ĉu rubaĵojn), jen ampleksa vendohalo, jen parkejo por la veturiloj de la klientoj.

Praktike, kio estas mia ĵaŭda tasko en tiu metiejo ? Precipe dispartigi la objektojn de miaj kolegoj selektitajn kiel ne-rebazarvendebajn, kaj fine kolekti en pluraj ujoj erojn da diversaj krudaj materialoj : ĉefe fero (magnete eltirita), aluminio, latuno, kaj pli malofte stano,

kupro, rustigita ŝtalo, plumbo... kaj « finfinaj rubaĵoj » forŝutendaj. Tre diversaj estas tiuj objektoj : kuiriloj, kranoj, lumigiloj, rakedoj, motoroj... Per simplaj iloj (ŝraŭbilo, martelo, diskmaŝino... kaj ĉefe magneto !), mi malmuntas, malfiksas, detruas : jen bonsaniga okupo por menso kaj fingroj ! Aliflanke aparta manipulo valoras por la elektraj kaj elektronikaj forĵetaĵoj (akronime D3É en la franca, « Déchets d'Équipements

Électriques et Électroniques ») : televidiloj, lavmaŝinoj, komputiloj... Pro teknikaj kaj juraj kialoj, ĉi-lastaj objektoj estos grandskale traktitaj de specifaj firmaoj, per perfektigitaj ilaroj kapablaj priuzoli maloftajn gasojn, grandvalorajn metalojn, venenajn materialojn.

Antaŭ ĉiutaga amaso da plukitaj objektoj, tiklas la tasko elekti kiajn aĵojn taŭgos por reenbazarigo : ĉu valoras sidigi ĉi-tian bagatelon sur la bretaron, je kioma prezo, dum kiom da semajnoj ? Jen faka afero por komercema spertulo (ne por mi !)...

Konklude, nia asocio plenumas duoblan pluson : unue, reenbazarigi utilajn ĉipajn objektojn por la lokaj malriĉaj (aŭ fervoraj) loĝantoj ; due, ebligi, ke la balotelektitoj regu sian taskon, t.e. ekologie majstru la disvolvon de sia teritorio. Per mia modesta partopreno, mi ĝojas helpi en tia nobla kolektiva afero.

Tamen, verdire du zorgoj stumbligas mian bonhumoron :

- Mi bedaŭras konstati, ke multaj klientoj emas aĉeti bagatelajn neutilajn luksaĵetojn, pro kolektema plezuro kadre de

Per simplaj iloj (ŝraŭbilo, martelo, diskmaŝino... kaj ĉefe magneto !), mi malmuntas, malfiksas, detruas : jen bonsaniga okupo por menso kaj fingroj !



konsumema socio ; tiuj objektoj laŭvice estos baldaŭ denove forĵetitaj ! Tamen, agnoskindas ke oni aĉetas amason da brokantaj vesteroj, mebleroj, libroj, ekipiloj, kio efike utilas.

• Laŭmezure kiam pligrandiĝas la ekonomia merkato de ekologio en oficialaj rondoj, disvolviĝas amaso da firmaoj motivitaj de nur financaj celoj, emaj per egaj monrimedoj superokupacii la lokon

ĝis nun okupitan de simpatiaj « apudemaj asocioj ». Ĉu fatalas tia estonta sorto ? (3)

Okaze de la printempa mastrumado de via subtegmento, ne hezitu alporti viajn malnovaĵojn al via najbara reutiligejo (aŭ forĵetaĵejo) : vi ŝpare plibonigos nian komunan medion !

Vinĉjo Courouble

(Marseille-en-Beauvaisis), aprilo 2015.

(1) Aŭ « *selekta specigo* », t.e. « *tri selektif* » : *laŭ banala pleonasmo !*

(2) *Oficiala termino estas « komunumo de municipoj », establo publika de kunlaborado interkomunuma : faka jargonno !*

(3) *Flanka debato : se Esperanto estus moninteresa, ĝi fulme disvolviĝus fare de industriaj aferistoj, ĉu ne ?*

Malsamaj kamionoj, malsamaj profesioj À chaque camion son métier

Pejzaĝo, vojo, veturiloj kaj, inter ili, unu, pli granda ol la aliaj, veturas.

Longa je dek ses metroj, kun dek ok radoj, peza je kvardek kvar tunoj plenplena, forta je ĉirkaŭ kvincent ĉevalpovoj, kaj, malantaŭ la direktilo, eble staras mi aŭ unu el miaj kolegoj.

Nun de preskaŭ dudek jaroj mi veturigas tiujn « vojmonstrojn » ĉar mi estas, sed vi jam komprenis, kamion-ŝoforo. Jen profesio, kiun ĉiuj konas, kiu foje timigas la stirantojn de malpli grandaj veturiloj, sed kiu estas fakte miskonata de la plejparto de homoj.

Tion dirinte, tiu, kiu stiras kamionon estas nomata « kamionisto » sed, fakte, ĉu vere ŝofori estas la nura metio ?

Fakte, laŭ tio, kion oni transportas, laŭ la lokoj kie oni veturas, la distancoj aŭ la vojtipo, la diferencoj estas tiom multnombraj, ke « ŝoforo » estas profesio kiu en si mem entenas milon da ili.

Sed kio estas finfine tiu profesio, kiu kapablas kaŝi milon da ?...

Ĉar jes ja, kamionisto ne nur stiras kamionojn, kiuj, krome, povas kelkfoje tiom malsimili unu al la alia, ke nepras lernotempo por scipovi veturi iun aŭ la alian. Kamiono por liverado ne stireblas same kiel kuploŝelakamiono, kiel kamiono kun remorko, kiel escept-granda veturilo. Oni ankaŭ ne stiras sammaniere sur belaj gudritaj vojoj, sur montaj vojetoj aŭ sur ŝtonhavaj vojstrektoj. Malsame ankaŭ rilatas al tio, kion oni transportas, ĉar la stirado povas esti laŭkaze tre malsimila kaj multe pli teknika. Ankaŭ pri la ŝarĝado, la malŝarĝado kaj la ŝarĝifikado respondecas la kamionisto. Ĉu indas aldoni, ke kamionisto, kiu liveris viahejmen paketon, ne estas tiu, kiu kutimas veturigi citernon plenan je lakto, je gazo aŭ je acido ; eĉ ne tiu, kiu transportas arbotrunkojn, aŭtomobilojn aŭ bestojn ; nek tiu, kiu liverportas betonon, ĉarpentaĵon, moveblajn domojn, levmaŝinon aŭ ŝipon.

Inter ili, tamen estas tiuj, kiel mi, kiuj preferas reveni hejmen ĉiuvespere ; tiuj, kiuj stirante po miloj da kilometroj semajne revenas hejmen nur unufoje semajne aŭ eĉ monate.

Do jes, tiu profesio, ege miskonata, estas pli ol simpla laboro, ĉar ĝi fakte kaŝas milon da profesioj. Eble tial oni ĝin satas.

Tial, venontfoje kiam vi vidus kamionon, demandu vin kian profesion vere faras la ŝoforo. Lasu foriri, kun li, vian imagpovon. Dume, atendente preterpason de via imagpovo en la stirejo de mia kuploŝelakamiono, mi deziras al vi bonan tagon kaj bonan vojaĝon.



Un paysage, une route, des véhicules et, parmi eux, il y en a un plus gros. Seize mètres cinquante de long, dix-huit roues, quarante-quatre tonnes chargé, près de cinq cents chevaux et, derrière le volant, c'est peut-être moi, ou un de mes collègues.

Depuis dix-huit ans maintenant je conduis ces « monstres » de la route car je suis, vous l'avez compris, chauffeur routier. Une profession que tout le monde côtoie, qui inquiète parfois les conducteurs de véhicules plus petits, mais qu'en réalité, peu de gens connaissent.

Cela dit, une personne conduisant un camion est appelé « routier », mais est-ce vraiment là son métier ?

En effet, selon ce que l'on transporte, les lieux où l'on conduit, les distances ou les types de routes, les différences sont telles que « chauffeur routier » est, à lui seul, un métier qui en cache mille. Mais comment ça, un métier qui en cache mille ?...

Eh bien oui, conducteur routier ne se limite pas à conduire des camions qui, par ailleurs, sont parfois si différents que cela demande une petite formation pour passer de l'un à l'autre. Un camion de livraison ne se conduit pas comme un camion-remorque, un semi-remorque ou un convoi exceptionnel. De même, on ne va pas conduire de la même manière si l'on est sur de jolies routes goudronnées, sur des petites routes de montagne ou sur des chemins de terre. Les différences se font aussi en rapport avec ce que l'on transporte, car la conduite peut être très différente et plus technique. Donc, le chargement, le déchargement, l'arrimage de ce que l'on trans-

porte sont aussi de la responsabilité du chauffeur. Il va donc sans dire que le chauffeur-livreur qui vous apporte un colis chez vous n'est évidemment pas celui que vous avez croisé sur la route avec une citerne de lait, de gaz ou d'acide ; ni celui qui transportait des troncs d'arbres, des voitures ou des animaux ; pas plus que celui qui livrait du béton, des pièces de charpente, des mobil-homes, une grue ou un bateau.

Et parmi eux il y a ceux qui, comme moi, préfèrent rentrer tous les soirs à la maison et ceux qui, roulant des milliers de kilomètres par semaine, ne rentrent chez eux qu'une fois par semaine voire qu'une fois par mois.

Alors oui, ce métier très mal connu est bien plus qu'un métier, car il en cache mille. C'est peut-être pour cela qu'on l'aime. Ainsi, la prochaine fois que vous verrez un camion, demandez-vous quel métier fait, en réalité, le chauffeur. Laissez partir avec lui votre imagination. En attendant de croiser votre imagination dans la cabine de mon semi-remorque, je vous souhaite une bonne journée et un bon voyage.

Stefan' (el Francio)

Homa tajdo : almenaŭ 6 500 frenezuloj piedkuris trans « la Somme » !



La 2-a de Junio 2013.

Temas pri la fama regiona aranĝo « Transbaie », t.e. kunkurado (1) tra la golfeto de la rivero « la Somme », ir-kaj-reiro el la haveneto Saint-Valéry al la vid-al-vida marborda vilaĝo Le Crotoy, t.e. ĉirkaŭ 17 kilometroj da sablo kaj ŝlima koto...

Oni rendezuas en la elirplaco apud la malnovmoda stacidomo. Kia bunta svarma homamaso da ĉirkaŭ 30 000 uloj, t.e. kelkmiloj da kurantoj (2) kaj kvaroblo da familianaj aŭ amikaj subtenantoj (grava rolo !). Ĝoja festo, en kie profesiaj sportuloj najbaras grupojn da petolantaj amatoroj, fojfoje klaŭne maskovestitaj.

Komence, ni kuras po densa plotono sur la asfaltaj stratoj de la urbeto laŭ tri kilometroj ; tiam, post ponto superanta la kluzoj ni paŝas teran kajon laŭ la rivero Somme, kaj ni trafas la ebenan strandon (je malalta tajdo, kompreneble !) : dum kvin kilometroj da pli-malpli ŝlima sablo, ni transvadas flakojn de mara akvo kaj paŝaĉas sur la « Mollières », t.e. herbaj ebenaĵoj trankrucitaj de akutaj kotaj kavoj. Fore videblas la pintaj domoj de Le Crotoy (ŝajne tiom proksimaj, sed fakte lacege trafablaj !), kie staras bonvenita provianta budo : meritita premio, nepre nemalhavenda.

Nun temas pri retrokurado per paralela vojo ; iam la lacego sentiĝas, la plotono estas jam delonge disfibrita, la kuro iĝas elĉerpanta, eĉ teda : hej, plu kuraĝu ! Jam aŭdeblas la aplaŭdoj de la spektantoj je la alveno de la unuaj kurantoj (for for antaŭ mi !) : tiuj fortikaj sportuloj trakuras la plenan vojon dum malpli ol unu horo, brave ! Por la lastaj, ĝi daŭros po du horoj kaj duono... Sed ne gravas kiom ajn oni vicigaĝas, ĉefas partopreni, ĉu ne ?

Surloke ŝvebas ŝvita kaj ŝlima flaro, kompreneble ; sed kia amika feliĉo etosas inter ni ! « Nur nura plezura plezuro... kaj ankaŭ iom da laco » estis promesite : plenumita veto ! Venontan jaron, mi reos !

Kelkaj komentoj transgolfe irante.

Pri kio pensas la Transgolfeta kuranto ? Pri siaj piedoj, pri sia lacego, certe ; sed tamen li pensas ankaŭ pri la pejzaĝo, pri la najbaroj, pri sia ĉeesto en ĝi inter ili : oni ja havas tempon por observadi, eĉ por primediti ; zeno !

Ene de la filmo. Emociegas min la sento ke mi estas nun vivanta densan momenton, kiam mi ja staras ene de tia amaso da homoj serpentanta tra tia mirinda marborda pejzaĝo. Per poŝtkarto aŭ televido, hejme sidante en brakfotelo, oni povas imagi la scenaron de iu filmo pri naturekskurso : sed hodiaŭ mi vere estas aktoro en tiu filmo, ne nur mense sed konkrete korpe. Benita momento, feliĉa aktoro !

Vere mi sentas min aro, ano, parto de ĉi-tiu vivanta spektaklo : jen ĝusta signifo de « parto-preni ».

Pilgrimanta homamaso... Dum mia infanaĝo ni kantis en la preĝejo « *L'im-mense foule des hommes...* » (vastega svarmo da homoj), aŭ « *tout au long des longues plaines, peuple immense va chantant...* » (laŭ longaj ebenaĵoj grandega popolo vagas kantante).

Jes, ekde centoj da jarcentoj, laŭ miloj da generacioj, la homaro estas vaganta al... al sia destino : ĉu lame stumblanta, ĉu vikle decidema, jen « la popolo de Dio treniĝante... ĝis ci, Promesita Bieno ».

Tio ne estu teda afero ! Male, kun ĝojo ni kune kuras, helpante unu la alian dum malfacilaj paŝoj, kuraĝigante la elĉerpitajn, kaj eĉ aplaŭdante la fortikajn atletojn kiuj jam inverssencen laŭpasas nian vicon (fakte, la reirvojo el Le Crotoy paralelas la irvojon, tiel ke kruciĝas ambaŭ vicoj da lertaj kaj malrapidaj kurantoj).

Ĉu la Niagara Akvofalaro ? Bruas ĉirkaŭ mi vigla akvoplaŭdo : ĉu malsuprenfluegas montara torento ? Ne, nur estas cento da ŝuoj kiuj vadaĉas tra flako de mara akvo sternita sur la strando...

Plu kuraĝu ! Min incitas tiuj kurkomisaraj starantaj je la flanko de la vojo : bonkore ili intencas kuraĝigi nin kriante « baldaŭ alvenas vi ! ». Baldaŭ, baldaŭ, kompreneble estas baldaŭ : jam ekde la elirpunkto ni estas « baldaŭ » alvenantaj ! Alveni, nenion ni faras alie ol ĝi !

Ekzerco pri humileco kaj tolereco ! Kvankvam ne temas pri vetkurado kaj ne gravas la rango de mia alveno, mi estas tentita kompari min kun aliaj kunkurantoj. Mi strebas trovi en la plotono aron da kurantoj kiuj samfortas kiel mi ; ve, dum la tuta daŭro de la kuro mi vidas ke mi estas preterpasata de aliaj, eĉ de ŝajne malbonfartantaj ; feliĉe, ĉar mi estis bone lokita je la startlinio, restas miloj (komence miloj, poste nur centoj) da kurantoj malantaŭ mi ! Tia sporta provo estas taŭga lernilo por ne orgojle fanfaroni, por konsenti pri siaj propraj fizikaj (kaj mensaj) limoj. Jes, same kiel en la normala socio, mi devas agnoski ke ni estas malegalaj, ke ekzistas prauloj, antaŭuloj, sukcesuloj, kiuj plej efikas ol mi ; saniga leciono !

Tamen, dum la kuro, ĉefe je la reirparto estas kelkaj benitaj momentoj kiam mi sentas min sola, paŝanta laŭ mia propra ritmo, kiel en silenta nebulo ; jen min trafas ia dezerto, kvazaŭ mi estus drogata (fakte pro laco la cerbo produktas adrenalinon), mi sentas min zene ĝuanta : plezuro, feliĉo...

Sed tamen mi devas akcepti ke iuj ĉirkaŭkurantoj babiladas inter si (kiel ili havas sufiĉe da spiro por ĝi ?) aŭ eĉ bojas misĝentilajn petolaĵojn ... Tiel estas ilia propra plezuro, ĉu ne ?

Paroj da kruroj. Antaŭ ol starti, la kurantoj devas ariĝi malantaŭ la elirlinio dum unu horo ; teda momento, kiam densiĝas la subsune staranta homamaso dum bojegaĉas la laŭtsonorilo ! Mi trovis loketon kie mi sukcesis kaŭriĝi laŭ muro, tiel ke miaj okuloj estis je la nivelo de svarmo da kruroj : amuza perspektivo, per kiu oni spektas la divercecon de

gamboj (muskoleco, koloro, vileco, vir-
aŭ virineco) kaj de ŝuoj (malnov-
aŭ freŝmodaj, laĉitaj aŭ ne). Ĉiuj vicis per
paroj : mi ne trovis unukrurulon ! (Ta-
men kuros unubrakulo, kaj ĉareto « joë-
lette » specifa por handikapulo: brave !).

Hodiaŭ ni ĉiuj havas la saman volon,
la saman celon, la saman hobion. Mi
konscias ke po ĉiu paro da kruroj kon-
gruas ununura persono kiu travivas
sian personan sorton, kiu klopodas pri
sia persona estonteco, sia persona vojo
tra la vivo, trans la vivo ; kiu estas per-
sone zorgata de Dio... Kvankvam mi
konscias ke ni ne ĉiuj voĉdonas por la
samaj politikistoj, ke ni ne ĉiuj havas la

samajn vivrimedojn, ke ni ne ĉiuj sinte-
nas laŭ la samaj moralaj valoroj, tamen
mi spertas ĝis kiom ni estas anoj de la
sama homarego.

Tia amaso da bonfartaj kruroj lerte
starantaj antaŭ mia vizaĝo ne malhel-
pas min pensi pri la svarmoj da mallibe-
ruloj kiuj estis (plu estas) ĉarĝitaj po
centoj en brutarvagonoj direkte al kon-
centrejoj...

Strebo, streĉo, peno, sufero... feliĉo.
Oni taksas nin masofhismaj pro nia stre-
bo praktiki malkonfortan elĉerpantan
agadon. Jes kompreneble, ĉiu sporto kaj
ĉiu varbado enhavas iom da streĉo, kaj
eĉ fojfoje da peno. Sed oni ne povas nomi

ĝin sufero, ĉar verdire ni kuradas por
plezuro, je libera volo, laŭ konsentitaj
reguloj, sen ekstera perforta trudo. Ma-
le, se oni ne aŭdacas fronti iom da rezis-
to, ĉu oni povas atingi aŭtentan feliĉon ?

Vincent Courouble

(mi fieras : ĉi-jare la lasta ne estis mi !)
(1) *Mia vortaro tradukas « course » per
« vetkurso » aŭ per « konkurso », sed mi
ne samakordas kun ĉi-tio : fakte nenio
estas vetinde en tia aranĝo ; krome, te-
mas ja pri kune-kuri, sed ne pri
kon(traiŭ)kuradi ; tikle !*

(2) *Ili kalkulis po 6 300 enskribitaj, sed
mi ne dubas ke aldoniĝis ankaŭ kelkcen-
toj da kaŝpasaĝeroj !*

Tra la fenestro - Par la fenêtre

Saluton al ĉiuj,

Oni multe parolis lastatempe pri seksa turmentado, kiun
virinoj povas suferi, kaj pri povotroigoj, kiujn iuj viroj, profi-
tante sian situacion aŭ povon, praktikas kontraŭ ili. « Ankaŭ
mi – me too » kaj « stukaĉu vian porkon » disvastiĝis tra inter-
reto kaj liberigis la parolon de virinoj, kiuj, ĝis nun, ne aŭda-
cis diri ion, sentante sin, malprave, hontantaj rakonti kion ili
estis suferintaj. Tiu parola liberiĝo estas bonvena : neniu raj-
tas disponi pri aliulo kiel pri aĵo.

Multaj ankaŭ estis la debatoj pri turmentado de virinoj sur-
strate aŭ en publikaj trans-
portiloj. De nun monpuno po-
vos trudiĝi al « turmentadu-
lo » (ankoraŭ difinendos kie
komencas turmentado).

Tion ĉi dirinte, ĉu ni ne vi-
vas en kurioze hipokrita soci-
eto ?

Ĉiutage, reklamo instigas
nin al tuja kontentigo de niaj
impulsoj, « ĉar ja indas ni ! ». Ĝi
reduktas virinon, sed an-
kaŭ viron, al nura konsumen-
da objekto ; ĝi seksigas ĉion,
eĉ por vendi jogurtojn. Por
vendi ĉiam pli, ĝi faras eĉ pli,
ĝi subtenas senĉese fruecan
seksecon kaj proponas rembu-
ritajn mamzonojn al apenaŭ
sep-ok jaraĝaj knabinetoj.

Temas ja pri tio, kion oni
nomas psikiatrie « duobla ligi-
lo ». Unuflanke edukado di-
ras : « regadu viajn impulsojn,
respektu regulojn kaj leĝon »,
aliflanke , kaj ĉiutage, rekla-
mo gurdas nin : « liberlasu
vin , efektivigu viajn dezirojn,
frakasu la kodojn ! » kaj tio
povas frenezigi.

Kaj mi, kaj mi, kaj mi ?
Kiel mi sentas min en mia
montrofenestro ? Unue mi pe-
tas liberecon vesti min mia-
maniere. Ja ja ! Poste, trank-
viliĝu, ĉio glatas, pasantoj kontentiĝas malatente rigardi min,
kaj mi, mi elturniĝas tiel, ke ili interesiĝas ĉefe pri miaj fidelaj
amikoj, la libroj, ĉar ja indas ili, ĉu ne ?

Ĝis, Dzeka

P.S. : Comment ? Pas un mot sur le fameux congrès pari-
sien de SAT Amikaro ? Attendez, à l'heure où j'écris ceci, il
n'a pas encore eu lieu. Suspens !

Bonjour à tous,

Ces temps derniers on a beaucoup parlé du harcèlement se-
xuel que peuvent subir les femmes et des abus de pouvoir que
certains hommes, profitant de leur situation, ou de leur puis-
sance, exercent à leur rencontre. « Me too » puis « balance ton
porc » se sont répandus sur Internet et ont libéré la parole de
femmes qui, jusqu'alors, n'osaient rien dire, se sentant, à tort,
honteuses de raconter ce qu'elles avaient subi. Cette libération
de la parole est bienvenue : nul n'a le droit de disposer d'au-
trui comme de sa chose.



Nombreux ont été aussi les
débats concernant le harcèle-
ment des femmes dans la rue
ou dans les transports en
commun. Désormais une a-
mende pourra être infligée à
un « harceleur » (il restera à
définir où commence le harcè-
lement...).

Cela dit, ne vivons-nous
pas dans une société drôle-
ment hypocrite ?

Chaque jour la publici-
té nous pousse à satisfaire nos
pulsions, tout de suite, « parce
que nous le valons bien ». Elle
réduit la femme, mais aussi
l'homme, à n'être qu'un objet
de consommation ; elle sexua-
lise tout, même la vente d'un
pot de yaourt. Pour vendre
toujours plus elle encourage
également à une sexualité
sans cesse plus précoce et pro-
pose des soutiens-gorge rem-
bourrés à des fillettes de
sept-huit ans.

C'est ce qu'en psychiatrie
on appelle le « double lien » :
d'un côté l'éducation dit :
« maîtrise tes pulsions, res-
pecte les règles et la loi », de
l'autre, et quotidiennement,
la publicité nous serine :
« lâche-toi, réalise tes envies,

casse les codes ! » et cela peut rendre fou.

Et moi, et moi et moi ? Comment est-ce que je me sens dans
ma vitrine ? D'abord je demande la liberté de me vêtir à ma
guise, là ! Ensuite, rassurez-vous, tout baigne, les passants se
contentent de me regarder d'un œil distrait et moi, je m'ar-
range pour qu'ils s'intéressent surtout à mes fidèles amis, les
livres, parce que, eux, ils le valent bien, non ?

A+, Dzeka

Priskribu tiujn personojn !

Kiel ili estas vestitaj ? Kion ili portas ? Kiel ili vestis sin ? Ĉu ili estas elegantaj ?

Priskribu tiujn personojn (vestojn, ŝuojn, harojn, okupojn, ktp...)

Kaj komparu ilin : kio similas ? kio malsimilas ? Ĉu temas pri sama sezono ?

Kion fari ? Eblas paroligi pri la bildoj, doni la vortojn, kaj tiel plu. Poste legi laŭtvoĉe – celante aŭdan komprenkapablon – la sekvan tekston.

Ankaŭ eblas alimaniere prezenti la du personojn : Parole prezentu ambaŭ ulojn, per priskribado ; ĉefine indas substreki malsimilecojn (diferencojn) kies enhavon vi povas modifi laŭ-plaĉe. Jen ekzemplo :

Unua ebleco : priskribu tion, kion vi vidas ! Ekzemple :

Jen estas la bus-stacio. Atendas du personoj en printempo. Estas maljuna viro kaj juna virino.

Li portas dikan jakon kaj pluv-botojn, ĉar li timas la malvarmon. Li surmetis ĉapelon el felto.

La junulino metis printempan robon kaj pint-ŝuojn. Ŝi ne timas malvarmon. Sur la kapon metis ŝi ruĝan bereton kaj ĉirkaŭ la kolo kol-tukon de la sama koloro. La viro tenas pluv-ombrelon je la maldekstra mano, dum ŝi portas mansakon kaj ĵurnalon.

Ĉu vi observis ke ŝi havas bukajn harojn ? Eble ŝi estas blondulino ? La viro bone razis sian mentonon, sed ne la buŝ-harojn !

Dua ebleco : kultivu vian imago-povon ! Ekzemple :

Ĝenerale, la rilatoj inter filino kaj patro estas mildaj. Almenaŭ ĉe la familio Grinval'. Jes ĝenerale...



Sed ĉi-foje, ne tiel okazis : sinjoro Roĝero Grinval estas furioza. Li promesis al sia filino Alina, ke li volonte kondukos ŝin al la stacidomo. Ĉar li estas homo, kiu respektas sian honor-parolon, li tion faros, sed ho ve ! Li antaŭvidis uzi sian novan aŭtomobilon, pri kiu li fieras : bela kaj potenca Audi ! Kie kuŝas problemo ?

Nu, hieraŭ la filino petis de sia patro, ke li permesu al ŝi provi tiun novan akiritajn. Evidente, ĉe la komenco, li rifuzis ! Sed, ŝi insistis tiel kareseme : « Ho, mia kara paĉjo, pruntu al mi vian aŭton. Vi bone scias, ke mi estas ege pr-


denta kaj singardema »... Tiel, ke li ne plu povis rezisti kaj donis la aŭtomobil-ŝlosilojn al sia filino.

Evidente, malbona sorto atendis la filinon, kiu ne povis eviti drinkulon, stirantan ĉe la maldekstra flanko de la vojo ! Do, bedaŭrinde, la nova aŭto grave difektiĝis !

Tial, Roĝero akompanis sian filinon ĝis la stacidomo, sed kompreneble li ne estis parolema !

Kaj ŝia-flanke, Alina iom konfuze kaj embarasite preferis silenti. La aliaj busveturantoj tute ne povis diveni, ke temas pri patro kaj filino !

Ĉi malsupre kuŝas la solvo de la krucenigmo de la paĝo 11.



La Birdeto kaj la Motorciklisto

Iam, sur iu vojo, veturis motorciklisto. Subite, el lia maldekstra flanko, ekflugis birdetaro. La motorciklisto provis eble plej bone eviti ilin. Li bremsis, li devojiĝis, li premis sian kapon inter siajn ŝultrojn. Nenio sukcesis. Unu el la birdetoj frapis lian kaskon.

Sed, tre bonkora estis la motorciklisto, kaj plie, li ŝategis bestojn kaj ankoraŭ pli birdetojn. Do li bremsis, haltigis la motorciklon kaj ekserĉis la vunditan birdeton.

Li, finfine, ekvidis kelkajn rozkolorajn vostoplumojn kaj, kaŝite de la herbo kreskanta laŭ la vojrandoj, kuŝis, senkonscia, la serĉita birdeto.

Nia motorciklisto bonkora delikate prenis ĝin de sur la te-

ro, samdelikate metis ĝin ĉe sian koron en sian jakon, kaj prudente veturis al sia hejmo.

Tie, li elektis belan kaĝon en kiu li kuŝigis la birdeton sur etan matracon el dolĉa vato. Li aldonis tason da akvo kaj peĉeton da seka pano por ke la birdeto povu trinki kaj manĝi kiam ĝi rekonsciigos.

Post ĉirkaŭ duoj da horoj, feliĉe, la birdeto malfermis unu el la okuloj kaj, iom post iom, revenanta al la vivo, malfermis la duan. Nun, klare kaj vere elvekiĝinta, ĝi rigardas la ĉirkaŭaĵon. Vidante la kaĝ-stangetoj, la tason da akvo kaj la peĉeton da seka pano, ĝi premis sian kape-ton inter siaj du flugiletoj pensante : « Ve ! Mi mortigis la motorcikliston ! »

1 - 12,500
2 - 16,204
3 - 19,907
4 - 23,611
5 - 27,315
6 - 31,019
7 - 34,722
8 - 38,426
9 - 42,130
10 - 45,833
11 - 49,537
12 - 53,241
13 - 56,944
14 - 60,648
15 - 64,352
16 - 68,056
17 - 71,759
18 - 75,463
19 - 79,167
20 - 82,870
21 - 86,574
22 - 90,278
23 - 93,981
24 - 97,685
25 - 101,389
26 - 105,093
27 - 108,796
28 - 112,500
29 - 116,204
30 - 119,907
31 - 123,611
32 - 127,315
33 - 131,019
34 - 134,722
35 - 138,426
36 - 142,130
37 - 145,833
38 - 149,537
39 - 153,241
40 - 156,944
41 - 160,648
42 - 164,352
43 - 168,056
44 - 171,759
45 - 175,463
46 - 179,167
47 - 182,870
48 - 186,574
49 - 190,278
50 - 193,981
51 - 197,685
52 - 201,389
53 - 205,093
54 - 208,796
55 - 212,500
56 - 216,204
57 - 219,907
58 - 223,611
59 - 227,315
60 - 231,019
61 - 234,722
62 - 238,426
63 - 242,130
64 - 245,833
65 - 249,537
66 - 253,241
67 - 256,944
68 - 260,648
69 - 264,352
70 - 268,056
71 - 271,759
72 - 275,463
73 - 279,167
74 - 282,870

Pseudo page 17, pour faciliter les manipulations

Bien sûr, rien ne paraîtra au-delà de la page 16, mais avec le logiciel de mise en page Scribus, il est souvent utile d'ajouter des pages pour avoir un endroit où déposer les éléments que l'on manipule. C'est de la cuisine technique, ne vous en inquiétez pas. :-)

Pseudo page 18, pour faciliter les manipulations

